

Etnismo


N-ro 103 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 15.07.2019



2019

Internacia jaro de
indiĝenaj lingvoj

LE CHÈLÀ CHÈ LÈVÈ PO TI



La suno leviĝas por ĉiuj ... lingvoj!

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldonista letero, p. 3.
- 96a Germana Esperanto-Kongreso en la UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj, p. 4.
- La francprovenca lingvo ankaŭ nomata arpitana, p. 5-17.
- Esperanto-movado kaj indiĝenaj lingvoj. Naskiĝo de IKEL, p. 18-19.
- Mankas transdono de la bretona, p. 19-20.
- Sekve el ..., p. 20.
- IKEL-informilo 82, p. 20.

REVIZIADO POR TIU ĈI NUMERO: *Brian Moon*, *Nancy Fontannaz* kaj *Alain Favre*. Dankegon al ili!

FOTO SUR LA KOVRILPAĜO: Sunhorloĝo en la friburga urbeto *Bulle* (Svislando) kun skribo en la friburga dialekto de la arpitana: «*Le chelâ sè lève po tî.*» En ORB (p. 13-14): «*Lo solely/chely sè lève por tués.*» El Vikimedio, 13an de aprilo 2009, aŭtoro *Tony Bowden*.

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5 €). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la "IKEL-*Informilo*" estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: *Alain FAVRE* (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com;

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch

SEKRETARIO: *Nikolas XIL CARVALHO* (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: *Xabier RICO ITURRIOTZ* (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio
retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÒS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "tria-monda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian IKEL-kotizon **ekskluzive** al la konto de IKEL ĉe UEA (kodo: **ikel-y**), UNIVERSALA ESPERANTO- (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- BELGA poŝtĝirkonto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**
- GERMANA (Koln) pĝk n-ro **318291- 509**
BLZ 370 10050 IBAN:
DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF
- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64** IBAN:
NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21
- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**
IBAN: SE9595000099604200743740,
SWIFT NDEASESS
- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku "ikel-y" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Perantoj:

- FRANCIO eblas sendi ĉekojn al *Alain Favre*. (Poŝtadreso ĉi-supre.)
- NORVEGIO <oficejo@esperanto.no>.
- KATALUNIO Víctor Solé v.sole@esperanto.cat

Eblas reklami en *Etnismo*! Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.

Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Venonta redaktolimdato:

30-a de septembro 2019

ELDONISTA LETERO

2019, jaro de indiĝenaj lingvoj

Jam la elekto de la ĝusta adjektivo en nia verda lingvo povas kaŭzi problemojn. “Indiĝena” estas en pluraj kulturoj sufiĉe malestima vorto, oni pensas se ne pri iaspecaj foraj “sovaĝuloj”, kun plumoj sur la kapo kaj osto tra la nazo, almenaŭ pri iel “foraj” subevoluintaj homoj. Ja en PIV oni ankaŭ trovas la vorton “aŭtokton/o”, kiu eble pro ties grekskienca deveno aspektas laŭ iuj pli digna, almenaŭ pli serioza. Kaj laŭdifine, en tiu sama vortaro, aŭtoktono estas praloĝanto, kun la jena ekzemplo: “tamaziĥtoj estas aŭtoktonoj en Nord-Afriko”. Sed jen alia problemo: kio vere estas “praloĝanto”? Verŝajne antaŭ la alveno de tamaziĥtoj, eble de mezorienta aŭ sudeŭropa deveno (genetike la plej proksimaj parencoj de la loĝantoj de centra Maroko estas la korsikanoj), estis en norda Afriko aliaj membroj de la specio *Homo sapiens*. Ĉar temas pri tre vojaĝema specio, kiu ekde sia apero scipovis produkti fajron kaj havis trafikajn ĉasteknikojn. Tial ĝi povis konkeri grandan parton de sia planedo, inkluzive de malvarmaj kaj dezertaj lokoj. Kaj etno povis anstataŭi alian longe antaŭ la historia periodo, pri tio ni scias nenion. Ne parolante pri surlokaj evoluoj, apudaj influoj, miksiĝoj, finfine banalaj fenomenoj, bedaŭrinde foje okazintaj en perforta, eĉ genocida etoso.

Multaj ligas tiun jam tre relativan praloĝantecon al koloniado, plejofte fare de eŭropanoj, kiuj altrudis ne nur sin mem sed ankaŭ sian lingvon kaj vivmanieron al surlokaj homoj. Tiel indiĝenaj lingvoj devus ekzisti nur en tiaj regionoj, sed entute ne en Eŭropo. Iuj ŝtatoj provas maksimume redukti la difinon de indiĝenaj lingvoj por daŭre agi minimume rilate siajn lingvajn malplimultojn.

Male, kvankam de eŭropa deveno verŝajne de multaj generacioj, mi konsideras min indiĝeno en mia regiono, malgraŭ la fakto, ke nur unu el miaj gepatroj devenis de tiu sama regiono. Tio restos eĉ se mi devos translokiĝi: mi ĝismorte estos savoĵano kaj parolanto de la arpitana. Tiu lingvo formiĝis surloke, ĉefe el la latina, kaj estis uzata jam pli ol jarmilon. Multegaj loknomoj kaj familinomoj venas el ĝi. Kaj tiu “regiona” lingvo, tamen parolata en tri nunaj ŝtatoj, estas aparte minacata, viktimo de iaspeca koloniado. Jen ekzemplo inter multaj aliaj, pri kiu vi povos ekscii en tiu ĉi numero.

Mi devas danki al nia redaktorino kaj vicprezidantino, *Nicole Margot*, kiu reprezentis **IKEL** kaj alportis kontribuojn en la 96a Germana Esperanto-Kongreso, okazinta inter la 7a kaj 10a de junio en *Neumünster* (Ŝlesvigo-Holstinio). Germana Esperanto-Asocio havis la trafan ideon aliĝi al la UNO- kaj UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj. Kio implicis gravajn prelegojn prezentitajn dum tiuj tagoj, iuj kiel aludite jam legeblaj en tiu ĉi numero; espereble ni povos publikigi aliajn en la venonta.

Malgraŭ sia malforto kaj eteco, **IKEL** provas plu agi, *Etnismo* daŭre aperas. Kaj ni kompreneble atendas viajn kontribuojn kaj subtenon. Nur per ili nia asocio sukcesos pluvivi.

Alain Favre

96a Germana Esperanto-Kongreso en la UNESKO-Jaro de indiĝenaj lingvoj

La germanaj esperantistoj ĉi-jare elektis kiel temon de sia kongreso “La indiĝenajn lingvojn” kaj registris la kongreson kiel kontribuon al la UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj.

IKEL estis invitita kontribui kaj via redaktanto vojaĝis al Norda Germanio por prelegi unue pri la rilatoj inter la Esperanto-movado kaj indiĝenaj lingvoj kaj due pri la arpitana lingvo.



Inaŭguro: **Andreas Diemel**, el la organiza komitato, parolas. **Ulrich Brandenburg** kaj **Seán Ó Riain** sidas.

Dum la inaŭguro, la prezidanto de GEA **Ulrich Brandenburg** rimarkigis, ke «la termino “indiĝenoj” sonas laŭ la kolonia epoko en Afriko: homoj loĝantaj surloke, kontraste al la reprezentantoj de la kolonia potenco. Indiĝenaj lingvoj tamen ekzistas ĉie: inter la “unuaj nacioj” en Ameriko, Azio kaj Aŭstralio, kaj ankaŭ en Eŭropo, kie ni kutimas paroli pri (aŭtoktonaj) etnaj aŭ lingvaj minoritatoj.» Citante la fakton, ke el «6500 lingvoj hodiaŭ plu parolataj en la mondo, pli ol 3600 estas minacataj malaperi», li demandis sin «ĉu tio entute gravas, kaj kiel rilati al la temo inter esperantistoj?»

Dum la sama inaŭguro ni aŭdis du prezentojn de indiĝenaj lingvoj:

- **Eduard Werner/Edward Wornar**, fakulo pri la sorabaj lingvoj (1), prezentis la situacion de tiuj lingvoj en orienta Germanio. Profesoro Doktoro **Edward Wornar** studis interalie slavistikon kaj eklernis la sorabajn lingvojn kiel studento. En 1993 li eklaboris kiel scienca kunlaboranto en la Soraba Instituto en *Bautzen/Budyšin* kaj ekde 2003 estras la instituton en *Leipzig*. Tiu instituto edukas la sorablingvajn instruistojn, kaj en ĝi funkcias esplorcentro pri minoritataj lingvoj. Ekzemple eblas lerni ankaŭ la irlandan lingvon en tiu centro.

- **Seán Ó Riain** parolis pri la irlanda lingvo en EU.

«Kiam la 1an de januaro 2007 la irlanda lingvo iĝis la 21a oficiala lingvo de EU, ĝi jam estis lingvo de literaturo dum 1410 jaroj.» Ĝi eĉ fariĝis la unua literatura lingvo de Eŭropo per literatura teksto en la irlanda: *Amra Cholum Chille* (La Lamento por Sankta Colm Cille) verkita en la jaro 597. Sed jam en 1366 anglaj leĝoj kontraŭis la irlandan.

Post la dimanĉaj ekskursoj, lunde matene oni aŭdis pri du gaŭlrolatinidaj lingvoj, la okcitana prezentita de *Jean-Marc Leclerc*, pli konata kiel *JoMo*, kaj la arpitana. La fakto, ke tiuj du lingvoj najbaras, estis aparte interesa kaj *JoMo* finis sian prelegon per iu “adiu!”, klarigante, ke tiel oni adiaŭas unu la alian, sed ankaŭ salutas sin reciproke en la okcitana kaj en la kataluna. Kaj mi povis ekprelegi per ia “adju!” ĉar ankaŭ tiel oni salutas sin en la arpitana.

Beninano estis invitita paroli pri la indiĝenaj lingvoj de sia lando, sed li verŝajne ne ricevis permeson vojaĝi al Germanio. Bedaŭrinde!

Tre sukcesa kaj interesa kongreso en la ĉarma norda urbo *Neumünster*. En tiu ĉi numero vi povos legi la prelegojn de via redaktanto, kaj mi forte esperas, ke en venonta numero vi povos legi la aliajn kontribuojn.

Noto:

(1) Supra aŭ suda soraba parolata en la regiono de *Bautzen/Budyšin* kaj malsupra soraba aŭ norda parolata ĉirkaŭ la urbo *Cottbus/Chošebuz*). En la numero 96 (2015) oni povis legi artikolon de *Kimura Goro Christoph* kun la longa titolo: «“Deteritoriiĝo” ĉe la german-pola landlima regiono kaj ĝia signifo por la malplimulta soraba lingvo: el vidpunkto de lingva pejzaĝo».



Eduard Werner prelegas pri la soraba.

ro diri "jes" en ili: "ojl" norde kaj "ok" sude. Tiuj tri gaŭlolatinidaj lingvoj aŭ dialektaroj evoluis surbaze de la latina sed malsimile.

- **La ok-lingvoj aŭ okcitanaj:** Latiniĝo de tiuj regionoj okazis tre frue kun malmultaj keltaj kaj ĝermanaj influoj.

- **La ojlaj lingvoj:** En la nordo de Gaŭlio la latiniĝo estis pli malfrua kaj la franka lingvo, ĝermana, ege influis la ojl-dialektojn, el kiuj venas la franca. Tiu ĝermanigo ne aparte alportis ĝermanajn vortojn sed influis interalie la prononcon kaj kaŭzis la malfortiĝon de la neakcentataj finsilaboj de la latina. Tial en la franca la lasta silabo estas akcentata, kiam ĝi ne estas mutiĝinta.

- **La arpitana/francprovenca:** Sur la arpitanaj teritorioj la latiniĝo ne estis influata de ĝermanaj lingvoj ĉar la burgundoj (ĝermana popolo, kiu okupis tiun lokon) ekparolis la latinan. Tial la arpitana konservis la neakcentatan finsilabon de la latina. Vidu subajn ekzemplojn:

Esperanto	Franca	Arpitana
Arbo	Abre (e muta)	Âbro (m.)
Tablo	Table (e muta)	Trâbla (f.)
En la arpitana la lastaj silaboj estas prononcataj sed ne akcentataj.		



El Vikimedia.

Graziadio Isaia Ascoli el la juda enciklopedio *Brockhaus kaj Efron*.

Arpitanaj teritorioj

Sur la mapo de la paĝo 5 vi vidas la arpitanan teritorion pli detale. La lokaj nomoj estas skribitaj per komuna ortografio proponita por la arpitana, pri kiu mi pli detale raportos poste.

En Francio situas la plej vasta parto de la arpitanaj teritorioj: la du savojaj departementoj, plej sude la teritorio atingas Daŭfenlandon, ĝis sude de Grenoblo, teritorio kie reciproke influas sin la okcitanaj kaj la arpitanaj. Liono estas plene en la teritorio; okcidente oni trovas Fonezon kaj norde la sudon de Burgonjo kaj de Franĉkonteo.

En Svislando la tuta franclingva aŭ romanda Svislando, krom la kantono Ĵuraso, norde de Neŭŝatelo, kiu parolas oĵlan dialekton de Franĉkonteo, al apartenas al Arpitano. Sud-okcidente de Lemano, la ĝeneva. Kaj norde la vaŭda kantono, pli oriente la valezo, la friburga kaj norde la neŭŝatela kantono kun tutnorde Ĉaŭdefono, bone konata de esperantistoj.

En nord-okcidenta Italio troviĝas la Aosta valo, kie la arpitana plej vivas kaj kelkaj nordpiemontaj valoj. En iu el ili, la valo Sūza, oni parolas okcidente la okcitanan, oriente la arpitanan, kaj la parolantoj de tiuj du lingvoj bone kunlaboras por pluvivigi siajn lingvojn. Plej strange, en Apulio vi trovas du vilaĝojn, kie la arpitana estas plu parolata: *Faeto* kaj *Celle San Vito*, kaŭze de enmigrado dum la 14a jarcento.

Graziadio Isaia Ascoli

La granda "kulpulo" de la konfuza nomo estas li, itala lingvisto de la 19a jarcento *Graziadio Isaia Ascoli*, kiu fakte ne nur kulpas. Li havas la grandan meriton esti la unua, kiu malkovris, ke iuj dialektoj parolataj en franclingva Svislando, en orienta Francio kaj nordoriente de Italio havas komunajn trajtojn kaj eĉ apartenas al iu aparta lingva tipo, do lingvo.

En 1873 li deklaris:

«**Mi nomas franc-provenca iun lingvan tipon, kiu kunigas, krom kelkaj propraj trajtoj, aliajn, kies parto komunas kun la franca lingvo (dialekto de la ojlaj lingvoj) kaj alia kun la provenca kaj kiuj ne venas el malfrua kuniĝo de diversaj elementoj sed male atestas pri propra historia sendependeco, ne tre malsimilaj de tiuj, per kiuj distingiĝas inter si la aliaj ĉefaj latinidaj tipoj.**»

*Graziadio Isaia Ascoli,
Schizzi franco-provenzali 1877.*

En tiu epoko la nomo "okcitanaj" ankoraŭ ne ekzistis kaj oni uzis por la tuta lingvo la nomon de la



La burgunda reĝlando en la 5a jarcento

El Vikimedia. Aŭtoro: G CHP.

dialekto parolata en la regiono de Marsejlo, la provença.

Gravas memori, ke se la francprovenca/arpitana kundividas lingvaj trajtojn kun la ojl-dialektoj kaj do la franca norde, kaj sude kun la okcitana, tiuj trajtoj aldoniĝas al **propraj trajtoj** kaj tio ne signifas, ke la arpitana estas miksaĵo de la franca kaj la okcitana. Kiel la aliaj latinidaj lingvoj ĝi venas rekte el la latina kaj posedas propran kaj sendependan historion.

Jen kial *Ascoli* donis al la lingvo tiun ĉi nomon. Al ĝi oni nun forprenis la streketon kaj skribas per unu vorto: **francprovença** (1).

Sed tiu nomo, se ĝi restas la oficiala, estas, kiel jam dirite, ege maladekvata kaj kreas senĉesajn konfuzojn. Eĉ respondeculoj de asocioj, uzante mian dialekton de la arpitana, fojfoje skribis al la kantona kultura konsilantino, ke ni ja parolas “okcitanan dialekton”. Kaj mi foje devis korekti artikolon en Vikipedio, kie oni asertis, ke la okcitana estas parolata ĝis en Svislando!! Iuj parolantoj de la francprovença, malkontentaj pri tiu ĉi konfuza nomo, ekuzis la vorton “**arpitana**”. Tio ne plaĉas al multaj arpitanningvanoj; ĉu ĉar ili tutsimple eĉ ne konas ĝin, ĉu ĉar ili terure miskomprenas, opiniante, ke temas pri alia lingvo. Longe la parolantoj de la francprovença nomis kaj plu nomas sian lingvon *patois* (dialekto). Male ĝi havas korvarmecan koloron, ŝatatan de la parolantoj, kiuj jam malfacile alutimiĝis al la nomo “francprovença”, do des malpli al “arpitana”. Sed, kiel jam dirite, mi ĝin

preferas pro klareco kaj ĝi estas uzata en la reto kaj internacive.

Tiu ĉi nomo havas la saman etimologion kiel la loknomo “Alpoj”, kiu fakte venas el la arpitana (pli fore el la antaŭkelta radiko “alp”, en la arpitana prononcata “arp”) kaj signifas montaran paŝtejon, kiu povas troviĝi en Alpoj sed ankaŭ en pli malaltaj reliefaĵoj, kiel Ĵuraso kaj alie. En la aostvala dialekto *arpian* signifas “bovgardisto” kaj *arpitan* “montarano”. Do la arpitana estas la lingvo de teritorio, kie oni uzas tiun ĉi nomon. Oni elektis ĝin ankaŭ pro ĝia proksimeco kun la vorto “okcitana”.

Historio

Ekde la Romia Imperio ĝis la fino de la Mezepoko

Malfacilas priskribi la historion de la arpitana ekde la unuaj jarcentoj, ĉar tiu ĉi lingvo estis nur parolata, la skriba lingvo estis la latina. Oni povas nur supozi, ke la unua Burgunda reĝlando (443 - 534), kaj post ĝi la dua Burgunda reĝlando (888 - 1032) donis al ĝi iun geografian unuecon. Sed kiel jam dirite la burgundoj ekparolis la latinan kaj ne transdonis sian lingvon, krom kelkajn vortojn kaj ĉefe toponimojn.

Oni povas vidi sur la maldekstra mapo, ke la teritorio de la unua burgunda reĝlando respondas iom al tiu de la arpitana. Nur la sudo ne koincidas, ĉar la uzado de la arpitana limiĝas al la sudo de Grenoblo. Koncerne la nordon, studoj montras, ke iam la arpitana estis parolata en la nordokcidento de Svislando, en Alemanio kaj en la nordo de Franĉkonteo.



— Limoj de la Burgundia Reĝlando, ĉirkaŭ 900.
 — Limoj de la akiraĵoj en 926.
 — Limoj de la akiraĵoj en 942.
 — Aosta Valo akirita je la fino de la 10a jarcento (?).

Mapo el la libro: “L’an 88, Le Royaume de Bourgogne”, F. Demotz.

Dua burgunda reĝlando.

Disdialektiĝo

Kvankam tekstoj mankas (normala fenomeno en okcidenta Eŭropo, kie oni longe skribis latine), fasko da indicoj indikas, ke la arpitana longe estis sufiĉe unueca, eĉ post la malapero de la dua burgundia regno, ĉirkaŭ la jaro 1030. Tiu politika ŝanĝo ne estis tiom grava, la homoj facile iris de unu urbo al alia, inter Savojo, Francio, Daŭfenlando... Supozeble la gravaj problemoj klimataj, militaj, epidemiaj... ekde la 14a jarcento reduktis la kontaktojn, restigis pli ofte la homojn en iliaj valoj. Tamen en la 16a jarcento francaj okupaciantoj de Savojo petis de *Nicolas Martin* verki kanzonojn, kiujn ili bone komprenis, devenante de Liono aŭ Grenoblo kaj tial parolante aliajn sed ne tiom malsamajn versiojn de la arpitana. Ankoraŭ en la 17a jarcento oni ludis teatraĵojn en Liono, kie aperis savojaj roluloj por ridigi la publikon interalie per sia diversa do amuza parolmaniero de la sama lingvo.

Ŝajnas, ke gravaj fonetikaj evoluoj okazis dum la lastaj tri, eĉ du jarcentoj, foje eble malpli. Bona ekzemplo estas la palatigo de la c latina, tio estas la superfonemo {c}: **capra** restis **capra** en la itala, iĝis **cabra/cabro** en la okcitana depende de la skribmaniero, sed **chèvre** – kun komenca <j> – en la franca kaj **chiévra** en la arpitana skribita per ORB, kun nun tre malsamaj prononcoj laŭ la loko, kiujn oni en fonetika grafio skribas <j>, <tj>, <ts>, <st>, <tj> aŭ en Savojo tre ofte <θ> kaj ne nur. Same vokaloj tre evoluis, la nazalaj pli- aŭ malplimultiĝante laŭ la dialektoj. Mi povis konstati, ke en iu vilaĝo multaj vokaloj estas diftongaj, dum en la apuda diftongoj tute ne ekzistas.

Kvankam baze unueca ĝis tia grado, ke ĝi sufiĉus por karakterizi la lingvon (la latinaj verboj kun **-are** donis du grupojn en la arpitana, respektive kun **-ar** kaj **-iér**, unika trajto inter la latinidaj lingvoj), la konjugacio povis varii des pli facile, ke mankis gramatikaj traktaĵoj por iom fiksi la lingvon kaj ... lernejoj, kie oni draste punus malseriozajn aŭ tro kreemajn lernantojn.

Nunaj arpitanoj de diversaj lokoj devas lerni interkompreniĝi, interalie per iom da kono de la dialektoj de la aliaj. Ĝis antaŭ dudeko da jaroj interregionaj kaj internaciaj renkontiĝoj okazis en la franca aŭ en la itala, sed nun oni ofte uzas la arpitanan mem. (vidu p. 12 - 13)

AF

La dua reĝlando de Burgundio en la 10a jarcento

La dua mapo (p. 7 dekstre sube) koncernas la duan reĝlandon de Burgundio. Ankaŭ Savojo iam ludis unuigan rolon, kiam ĝi vastiĝis ĝis granda parto de Romanda Svislando, Aosta valo, Piemonto ktp.



El Vikimedio. Aŭtoro: Tony Bowden.

Memortabulo al Marguerite d'Oingt en la bojeleza vilaĝo Oingt, kie ŝi naskiĝis.

Kelkaj studoj

Pluraj studoj estas faritaj provante trovi la periodon, kiam pli malpli kreiĝis la arpitana, estis faritaj. Seriozan esploron laŭ la toponimoj faris *André Krystol*, profesoro en la Neŭŝatela Universitato. Tiu lingvisto asertas, ke la arpitana jam estis aŭtonoma lingvo ekde la 5a-6a jarcentoj. Kaj tiel la tri najbaraj latinidaj lingvoj, la ok-lingvo, la francpro-venca/arpitana kaj la ojl-lingvoj estus pli malpli samaĝaj. Aliaj studoj estas faritaj pri merovidaj moneroj. La tiamaj monerfabrikantoj ne okupiĝis pri la latina kaj uzis la parolatan lingvon, do la arpitanan.

Literaturo

Kiel jam dirite la arpitana estis antaŭ ĉio parola lingvo sed tamen ekestis literaturo ekde la Mezepoko. Ŝajnas, ke en la 14a jarcento la svisa urbo Friburgo uzis oficiale la arpitanan en protokoloj kaj pridiskutoj en la urba konsilio. Notariaj aktoj estis skribataj en tiu lingvo.

La libro "Literaturo en la francprovenca antaŭ la 17a jc" de *Gaston Tuillon* (2) donas al ni interesajn informojn. Ĝis la fino de la 20a jarcento neniu arpitana verkisto celis iun komunan arpitanan lingvon (kiu fakte ne ekzistas). Ĉiuj verkis en propra dialekto kaj propra skribo.

Unu el la unuaj tekstoj konataj estis verkata en liona dialekto, temas pri la “Vivo de Sankta *Beatrice d’Ornacieux*”, ŝuldata al *Marguerite d’Oingt* en la 13^a jarcento (3).

Marguerite d’Oingt, el nobela familio de Bojolezo estis fama mistikulino de la kartuzia ordeno, unu el la unuaj poetoj de kiu ni ankoraŭ posedas tekstojn. Ŝia celo ne estis literaturo sed antaŭ ĉio edifo de ŝiaj religiaj fratinaj. Jen frazo el la “Vivo de Sankta *Beatrice d’Ornacieux*”, en la loka skribo, en ORB (vidu ĉapitron 10) kaj en Esperanto:

Origina ortografio**ORB**

Illi ytiet bun grant teins	Il etêt ben grant temps
que illi veit toz jors	qu’el vêt tojorn corpus
corpus Domini a la	Domini a la levacion en
levacion en semblanci	semblance d’on petit
d’on petit enfant.	enfant.

Esperanto

Estis ja granda tempo ke ŝi vidu ĉiam la Sinjoran korpon leviĝantan simile al eta infano.

En la 16a jarcento aperis multaj tekstoj ĉirkaŭ Ĝenevo rilate la Reformacion kaj la forpelson de katolikaj pastroj el Ĝenevo. La plej konata koncarnato ŝajnas esti *Jehan des Prez*. Li estas konata pro du manuskriptoj el la “Kanto pri lamentado kaj ĉagreno ĉe katolikaj pastroj” aperinta post kiam Ĝenevo forpeliis sian episkopon. Jen la unua strofo:

Origina ortografio**ORB**

Notron Evêque n’ ai pa	Noutron Evêque n’ est pas
béque	bétye
E dy de bale reyson.	Et dit de bèles rêsons.
E coude dire dé messe	Et cudie dere des mèses
E ne di que dé chanfon	Et ne dit que des
	chançons
Et denne à la pouvre gen	Et done a la pouvre gens
Dé perdon per leu-z	Des pardons por lors
argen;	argents;
E fa de to a sa guisa,	Et fât de tot a sa guisa,
De parady, marchansisa,	De paradis, marchansisa,
Le bon hom!	Le bon homo!

Esperanto

Nia Episkopo ne stultas	Kaj donas al malriĉuloj
Kaj diras belajn	Pardonojn kontraŭ mono;
cerbumĵaajn.	Kaj faras ĉion laŭ propra
Kaj provas diri mesojn	volo
Kaj diras nur kanzonojn	El Paradizo, varon
	La bona homo!

Iuj kiel *Jacques Gruet* afiŝis kontraŭkalvinistajn tekstojn (*placards*) en Ĝenevo. Kaj tio alportis al tiu mort-kondamnon kaj ekzekuton.

Tiu ĉi epoko naskis la ĝenevan himnon “*Cè qu’è lèncu*” (Tiu, kiu supras) kun 60 strofoj. Jen la unua:

Origina ortografio**ORB**

Cé qu’è lainô, lo Maitro	Celi qu’est lé-‘n hôt, lo
dé bataille,	mêtro des batalyes,
Que se moqué et se ri dé	Que sè moque et sè rit
canaille,	des canailles,
A bin fai vi, pè on de-	At ben fêt vi- per on des-
sando nai,	sando nuet,
Qu’il étivé patron dé Ge-	Qu’il ètêt patron des
nevouai.	Genevouês.

Esperanto

Tiu, kiu supras, la mastro de la bataloj,
Kiu mokas kaj ridas pri la kanajloj,
Ja vidigis iun sabatan vesperon,
Ke li estas ĉefo de la Ĝenevanoj.

Nicolas Martin estis interalie muzikisto en la savoja valo *Maurienne*. Li publikigis iun kantaroon en la jaro 1555 dum okupacio de Savojo far la franca armeo: «*Kristnaskaj kantoj kaj kantoj nove komponitaj en la vulgara franca lingvo kaj en la savoja, nomata “patois”*». Temis pri la unua presita libro kun la plej granda parto en la arpitana. Sufiĉe stranga kunigo de kantoj, kies duono enhavas religiajn kristnaskajn kantojn kaj la alia duono libertinajn amkantojn. Unu estas kontraŭreformacia.

Mi tre ŝatas la tekstojn de *Nicolas Martin*, la kristnaskajn kantojn, kies paroloj elvokas ege konkrete la popolan vivon de tiu epoko, kaj la libertinaj kanzonoj estas ege amuzaj.

Origina ortografio**ORB**

Vollieno allar tan bellaz	Volens-nos alar tant bella
meyssonieriz	mêssoniera
Vollienoz allar vincoraz	Volens-no alar oncora
meyssonar ?	mêssonar ?
Se vo vollie voz sarey la	Se vos voléd vos saréd la
premieriz ...	première ...

Esperanto

Ĉu ni volas iri, tiom bela rikoltistino,
Ĉu ni plu volas iri rikolti?
Se vi volus, vi estus la unua
Ĉu ni volas iri tiom bela rikoltistino
Se vi volus, vi estus la unua
El kvar aŭ kvin, kiujn mi volis ami.
Mi donos al vi belan korsaĵon
Oran kombilon por bone vin kombi.
Kiam ni estos tie malantaŭ la garbaro
Ni povos kune amori.
Ŝi kontentis kaj sekvas la amonton
«Kaj vi devos bone labori.»
La laboristo helpe de la laboristino
Laboris ĝis antaŭ la horo tagmanĝi.
La ŝafgardistino petis la laboriston
Rekomenci la laboron.

Ni rekte saltu al la 19a jarcento, eĉ se literaturo ne mankas intertempe, kaj mi mencias konatan savoĵan verkistinon, *Amélie Gex* (1835-1883), kiu verkis poemojn pri la savoĵa vivo en sia epoko. Ĝia verko estis reeldonita en 2012 en iu kolekto produktita de la tiama administra regiono *Rhône-Alpes* (Rodan-Alpoj). Kiel preskaŭ ĉiuj arpitanlingvaj eldonoj, ĝi aperis dulingve, france-arpitane. Sed la ortografio, kiun ŝi uzis estas sufiĉe facile komprenebla por aliaj arpitanoj ĉar ne tro fonetika, kiel okazis pro la posta tutsavoĵa ortografio de *Conflans*, pri kiu mi poste parolos. Ĉi sube vi povas legi la du unuajn strofojn de poemo, kiu parolas pri koboldo tipa de la alpaĵ regionoj, *lo sèrvan* (4). En la alpeĵaj ĉaledoj, laŭrakonte, oni metas ĉiunokte laktobovlon sur la fenestron por la alpa koboldo, kaj por danki, li venas nokte ordigi en la ĉaledo. Sed se tion oni forgesas, li venĝas sin per mokaj malordigoj.

Origina ortografio**La rima du sarvant**

Dette mâtre, couî-t-ou que
vâ
Tote lé né dièn la bovâ,

Cambin la pourta a'na
saraillè,
Breudâ le fèin parmi la
paille
Qu'on trouve présto èin sè
levant?
- Rose, y dâi être lo
sarvant.
Dette mâtre, la cemenâ
Couî-t-ou que vint la
ramonâ
Avoé se grippe,
avoé sè z'ale,
Quand l'hiver su lè rotè y
zâle?
Seimble qu'on l'èintéind
èin rêvant!
- Rose, y dâi être lo
sarvant.

ORB**La rima du sèrvan**

Déte mâtre, qui o est que
vat
Totes les nuêts dens la
bovâ,
Quand ben la porta at 'na
sarralye
Bredar lo fen permi la
palye
Qu'on trove préto en sè
levant?
- Rose, il dêt être lo
sèrvan.
Déte mâtre, la chemenâ
Qui t-o que vint la
ramonar
Avouèc ses grepes,
avouèc ses âles,
Quand l'hivèr sur les rotes
il gèle?
Semble qu'on l'entend en
rêvant !
- Rose, cen dêt être lo
sèrvan.

Esperanto: La poemo de la koboldo

Diru patrino, kiu iras
ĉiunokte en la bovejon
Kvankam la pordo havas seruron,
Ligi la fojnon en la pajlo,
Kiun oni trovas preta ellitiĝante?
- *Rose*, devas esti la koboldo.
Diru, patrino, la kameno
Kiu venas ĝin senfulgigi
Kun siaj ungegoj, kun siaj flugiloj,
Kiam vintre sur la stratoj frostas?
Ŝajnas, ke ĝin ni aŭdas sonĝe
- *Rose*, devas esti la koboldo.

El Vikimedio. Aŭtoro: *Gian Mario Navillod*.

Busto de la abato Jean-Baptiste Cerlogne en Saint-Nicolas, Aosta valo.

En la Aosta Valo *Jean-Baptiste Cerlogne* (1826–1910), katolika pastro kaj lingvisto promociis la aostajn kulturon kaj lingvon. Li verkis la unuan gramatikon, donis skribsistemon kaj vortaron al la aostvala arpitana, kiu mem enhavas plurajn dialektojn sufiĉe malsimilajn laŭ la alpaĵ valoj, sed ŝajne similaj al la najbaraj valezaj dialektoj. Li estis la unua aostvalano, kiu verkis en la arpitana kaj liaj lingvistaj studoj plu validas por kompreni la aostvalan arpitanlingvon. Jen parto de lia poemo pri “*Le quatre saisons/Les quatre saisons*” (5), la somero:

Origina ortografio

Arbeillâ de levèt, lo tsêten
l'est in corsa;
Vat fêre pe le tsan, rosseyé
le fromen.
Atot le loui d'or que tin
dedin sa boursa,
Vat payé le s-ouvrè que l'an
dzousu leur ten.
Lo papa l'impon sa fameille,

Tot l'est rèlliâ din sa
meison;
Seyé lo fen van se garçon

Et miere lo blâ van se feille.

Oh! din cella reutse saison
Tsacun melatte;
Tsacun melatte;
Oh! din cella reutse saison
Tsacun melatte a sa meison.

ORB

Harbelyê de levèt, lo chôd-
temps 'l est en corsa;
Vat fêre per les champs ros-
seyér les froments.
Atot les loudors que tint
dedens sa bôrsa
Vat payér les ovriers que
l'ant jousu lor temps.
Lo papa 'l empond sa fa-
melye,
Tot 'l est rèllâ dens sa
mêson;
Seyér lo fen vant ses gar-
çons
Et miere lo blâ vant ses fe-
lyes.
Oh! dens cela reche sêson
Châcun melate,
Châcun melate,
Oh! dens cela reche sêson
Châcun melate a sa mêson.

Esperanto

Leĝere vestita la somero kuras;
 Ĝi iras tra la kampoj rufigi tritikojn.
 Per la luidoroj entenataj en sia monujo
 Ĝi pagas la laboristojn bone uzintajn sian tempon.
 La paĉjo instrukcias sian familion,
 Ĉio estas planita en la domo;
 Falĉi fojnon iras la filoj
 Kaj rikolti tritikon iras la filinoj.
 Ho! en tiu riĉa sezono
 Ĉiu portas,
 Ĉiu portas,
 Ho! en tiu riĉa sezono
 Ĉiu ion portas al sia domo.

En la 20a jarcento la literaturo floras, ĉar la arpitanningvanoj pli komforte skribas kaj verkas ol parolas sian lingvon. Bedaŭrinde por la elparolo, sed tiu ĉi verkemo ebligas profundigon en la lingvon kaj riĉigas la literaturon. Tiuj verkistoj tamen konservis ligojn kun la arpitanaĵoj kaj kulturo. *Pierro Guex*, pastoro kaj vaŭda verkisto, kiu, interalie, tradukis la psalmojn rekte el la hebrea, kaj kiu havas poetan talenton kaj ŝatas filozofiumi en la arpitana estas altnivela ekzemplo. Jen, ĉi-sube parto de soneto verkita de li (6):

Loka ortografio

ORB

N'è pas pèsu, lo dzo que vâi N'est pas pèsu, lo jom que vêt
 clliorî la roûsa. fllorir la rôsa.
 Âo bin lo berboutzet dècoûte U ben lo barbôtset de-cout lo
 lo tsemin. chemin.
 Clli momeint de bounheu Celi moment de bonhor balyê
 balyî galésameint galésament
 L'è quemet lo bèsî d'onna Il est coment lo bèsier d'una
 felye amouâirâosa. felye amouerosa.

Dinse, onna poèsî, de son D'ense, una poèsia, de filon
 flyon vo z'arrouse, vos arrôse,
 Sarâ dein voutra vyà qu'on Serâ dens voutra vià qu'un
 brein de jessemin, bren de jasmin,

On dâo sounet, lerdzî, l'è cein Un dôx sonèt, lergier, o est cen
 que vo propouso. que vos propouso.


Esperanto

Ne perditas tag', kiu vidas flori rozon.
 Aŭ kampan bokbarbon apud la vojo.
 Tiu moment' feliĉa bele donita
 Estas kiel la kiso de enamiĝinta knabino.
 Tiel poezi' de river' vin akvumas,
 Estos en via vivo nur ĵasmenero,
 Dolĉa sonet' leĝer' al vi mi proponas.

La arpitana fronte al la franca

Ŝajnas, ke ĝis la fino de la 10a jarcento la arpitana estis la parolata lingvo sur ties teritorio apud la latina, kiu estis skriba.

Sed en Parizo, je la fino de la Karolida Regno, kies membro plej konata estas Karolo la Granda, la franca, variaĵo de la ojlingvoj, pli kaj pli fortiĝis kaj disvastiĝis post tempo, dum la kapetida dinastio, kiam la pikarda estis pli forta ol la franca, kiu vere elmergiĝis en la 12a jarcento. Tiun ĉi lingvon ŝajne alprenis la franca kortego. Tio ne tre klaras, ĉar mankas tekstoj de tiu epoko.



El Vikimedio.

Unua paĝo de la Edikto de Villers-Cotterêts.

Edikto de Villers-Cotterêts

Estas konate, ke en 1539, Francisko la unua devigis la uzadon de la franca kiel jura kaj administra lingvo de Francio anstataŭ la latina. Temas pri la fama **Edikto de Villers-Cotterêts** kun 192 artikoloj en mezmalnova franca lingvo donantaj, interalie, regulojn por redakti administrajn tekstojn. Jen elтираĵo de artikolo 111:

Ni ordonas: «proklami kaj redakti ĉiujn aktojn en la franca lingvo. Kaj, ĉar tro ofte okazis malbona kompreno de latinaj vortoj uzataj en tiaj tekstoj, ni volas, ke ekde nun ĉiuj decidoj same kiel ĉiuj aliaj proceduroj [...] estu proklamataj en la gepatra lingvo franca kaj ne alie.»

Oni komprenas ĉi tie, ke la latina ne plu estis komprenata de la popolo kaj ke necesis skribi en gepatra lingvo. Sed kio estis la gepatra lingvo?

Ŝajnas ke, ĉar estis pluraj gepatraj lingvoj en la franca reĝlando en 1539, iuj juristoj interpretis, ke la reĝa edikto koncernis ne nur la francan lingvon sed ĉiujn gepatrajn lingvojn de la reĝlando (7). En 1790 la Nacia Asembleo ektradukis la leĝojn kaj dekretojn en ĉiujn gepatrajn lingvojn antaŭ ol rezigni ĉar tio fariĝis tro kosta. Mi tamen dubas, ke nur la kosto kaŭzis tiajn decidojn. La dekreto de la 20a de julio 1794 devigas la uzon de la franca, kiel solan administran lingvon.

Prestigo de la franca jam antaŭe

Sed jam kelkajn jarcentojn antaŭe la franca fariĝis prestiĝa sur la arpitanaj teritorioj kaj aliloke. En la 14a jarcento, *Othon III de Grandson*, unu el la plej fruaj poetoj en la vaŭda lando, protektato de Amedeo la 8a de Savojo, jam verkis siajn poemojn en la franca lingvo de tiu ĉi epoko.



El Vikimedio: Aŭtoro: B. Brassoud.

Paĝo el la manuskripto: "La Respondoj al la cent Baladoj", ĉirkaŭ 1430, Laŭzana biblioteko kantona kaj universitata.

En la sama jarcento, kiam en Laŭzano oni volis verki juran tekston ne plu en la latina, sed en la "parolata lingvo" oni ĝin tradukis en la francan, kiu eble jam estis parolata en Laŭzano. Tamen en tiu ĉi "franca lingvo" estis multaj arpitanaj vortoj (8).

Grava punkto por pluvivigo de lingvo estas la traduko de la Biblio. Tio okazis ĉefe en la protestantaj urboj, Ĝenevo, Laŭzano, kaj Neŭŝatelo, kie la reformaciistoj estis parolantoj de la franca kaj promociantoj de tiu lingvo, kiel Kalvino, lia konsilanto *Théodore de Bèze* (francoj) kaj la bernanoj. Ne ekzistis la plej eta hezito traduki la Biblion en la francan, kiu fariĝis la

skriba lingvo. Granda enmigrado de protestantaj rifuĝintoj el suda Francio, kiu parolis la okcitanan, devigis uzi komunan lingvon, la francan.

Ankaŭ en Savojo, kiu entenis Aostan Valon kaj Piemonton, la franca fariĝis prestiĝa. La francaj okupacioj iom post iom alportis uzon de la franca lingvo. Post la franca okupacio de 1536-1539, la savoja duko, *Emmanuel-Philibert*, devigis la uzadon de la franca en Savojo kaj Aosta Valo kaj de la itala en Piemonto, kies okcitanaj – sed ne arpitanaj – valoj tamen ofte elektis la francan. La Edikto de *Rivoli* diris, ke «ĉiam kaj en ĉiu tempo la franca lingvo estis en nia lando kaj duklando Aosto pli komuna kaj ĝenerala ol iu alia kaj la popolo kaj regatoj de tiu lando kutimas paroli tiun ĉi lingvon pli facile ol ĉiun alian [...] tial ni volis per tiu ĉi edikto deklari nian volon, ke en tiu ĉi lando kaj duklando Aosto la oficialaj kaj juraj tekstoj estu skribitaj en neniuj alia lingvo ol la franca ...»

Per tiu ĉi teksto oni bone komprenas, ke la lingvan realon de la homoj oni tutsimple ne vidis, ĉar la savoja lingvo restis la gepatra por la homoj de la kamparo ĝis almenaŭ la komenco de la 20a jarcento.

Tuj post sia kreigo, la Vaŭda Kantono, liberigita de la berna okupacio far Napoleono, malpermesis la uzadon de la arpitana en la lernejoj (1806). Kaj proksimume la samo okazis en ĉiuj svisaj kantoj, kvankam la arpitana restis pli viva en la katolikaj kantoj, kiel Friburgo kaj Valezo.

Pluvivigi la arpitanan (19a ĝis 21a jarcento)

Paradokse, apenaŭ kelkajn jardekojn poste, oni ekpensis pri pluvivigo de la arpitana. La unua ŝajnas esti vaŭda pastoro, *Philippe-Sirice Bridel* (1757-1845), kiu verkis "*Glossaire du patois de la Suisse romande*" (Glosaro de la dialekto de Romanda Svislando), publikigita post lia morto en 1866 (9). *Bridel* verkis en iu eseo pri la Vaŭda Kantono (10): «La lingvo de la registaro, de la eklezio, de la juro kaj de publika instruado estas la franca. Oni ĝin bone parolas kvankam kun malrapidema akĉento, en Laŭzano kaj en niaj urboj, kaj ĉiuj loĝantoj de la kamparo ĝin komprenas kaj kapablas uzi. Sed en ilia hejma vivo, inter si, la kamparanoj uzas la dialekton (*patois*), kiujn ili nomas *Roman* aŭ *Reman*: tiu ĉi idiomo, pli antaŭa ĉe ni ol la franca, povas esti rigardata kiel lingvo; ĉar ĝi havas proprajn regulojn, el kiuj facilus verki gramatikon.»

Kelkajn jarojn poste, en 1899, *Louis Gauchat*, neŭŝatela lingvisto, kreis en Neŭŝatelo *l'institut du Glossaire des patois de la Suisse romande* (GPSR - "Instituto de la Glosaro pri la dialektoj de Romanda Svislando") kun kantonaj kaj federaciaj subvencioj. Ĝi kolektas la arpitanajn esprimojn en Svislando kaj en la tuta arpitana teritorio. Tre profunda studo, kies unua kajero aperis en 1924. Ĝis nun la studoj restas je la alfabeto litero G (11).

Diversaj individuoj kolektis arpitajn vortojn, inter ili *Louise Odin*, kiu donis multajn ekzemplojn el sia vaŭda vilaĝo *Blonay*. Tiuj diversaj kolektoj ebligis postan aperon de vortaroj kaj gramatikoj.

En 1862 aperis la unua *Conteur Vaudois*, franc-lingva gazeto, kiu donis grandan lokon al la arpitana. Sub diversaj formoj ĝi daŭris ĝis la komenco de la 20a jarcento.

En la mezo de la 20a jarcento, kiam la arpitana estis ankoraŭ la gepatra lingvo de multaj homoj en la kamparo aŭ montaro, oni komencis serioze okupiĝi pri propraj dialektoj. Aperis diversaj asocioj kaj, plej grave, la Romandsvisa Radio ekelsendis en la arpitajn dialektojn, ne nur svisaj sed ankaŭ savo- kaj piemontaj. Tiuj ĉiusemajnaj elsendoj aŭdiĝis sabate de 1952 ĝis 1992. La aŭdoteko en *Martigny* (Valezo) konservis ĉirkaŭ 1300 arkivaĵojn el tiuj elsendoj, unu el la plej riĉaj dialektologiaj kolektoj de Eŭropo, disponeblaj en la reto.

Samepoke kreiĝis *Fédération Romande des Patois* (Federacio Romanda de la Dialektoj), kiu kunigis arpitajn dialektoparolantojn ne nur de Svislando sed ankaŭ de Franĉkonteo en Ĵurasa kanton. Tiu federacio rapide akceptis la aostvalanojn kaj poste la savo-janojn kaj aliajn francajn arpitajn asociojn. Ĝi nun grupigas ĉiujn arpitajn teritoriojn kaj plu kunvenas ĉiujare en Laŭzano. Ĝia nomo fariĝis: *Fédération Romande et Internationale des Patois, FRIP* (Federacio Romanda kaj Internacia de la Dialektoj). En tiu ege dialektigita mondo ĝi estis la plej sukcesa por kunigi la arpitanojn. Sed tre bedaŭrinde ĝiaj kunvenoj okazas preskaŭ nur francelingve kaj la festoj, kiujn ĝi organizas ĉiun kvaran jaron, estas antaŭ ĉio folkloraj foiroj. Ĝi plu eldonas bultenon kvarfoje jare sed la fakto, ke ĉiu dialekto havas propran skribsistemon, devigas legi la diversajn tekstojn en francelingva traduko.

Tiujn lastajn jardekojn oni pli kaj pli konscias pri la problemo de tro granda uzado de la franca aŭ de la itala kaj provas fondi apudajn societojn komunikantajn en la arpitana kaj gazetojn nur en la arpitana. Tiaj movadoj restas minoritataj sed esperplenaj kaj interesas ĉefe junulojn aŭ mezaĝulojn. La lingva malfacilo grandas, ĉar niajn proprajn dialektojn malmultaj parolas ĉiutage, kaj al tio aldoniĝas la malfacila kompreno de la aliaj dialektoj. La najbaraj dialektoj povas esti tre similaj, sed por mi, ekzemple, malfacilas kompreni la lionan aŭ la piemontajn dialektojn plej forajn. Iuj radioj, kiel la friburga radio, kiu regule elsendas arpitane, helpas. Kaj mi mencias tre modestan retradon, prizorgatan de unu sola homo, kies enhavo venas el tuta Arpitano: *Radiô Arpitania, la radiô de tués les arpitans*"(11)

Ĉi tie ni menciis la gravan *Centre d'Etudes Francoprovençales* (Centro de Studoj pri la francprovenca) en *Saint Nicolas*, Aosta Valo. Fondita en 1967 apud la muzeo *Cerlogne*, ĝi ĉiam konservis rilatojn kun la dialektologia fako de la Neŭŝatela



cefp

CENTRE D'ETUDES
FRANCOPROVENÇALES
SAINT-NICOLAS - VALLÉE D'AOSTE



Universitato. Direktita unue de *René Willen* kaj kunlaboranta kun pluraj arpitalingvaj fakuloj, ĝi venigas esploristojn de la tuta mondo pri la arpitana, organizas la lernejan konkurson *Cerlogne* kaj konferencetagon ĉiujare en novembro, okupiĝante tiom pri la aostvala lingvo kiom pri la arpitana ĝenerale. Nun direktata de *Christiane Dunoyer*, antropologo, ĝi serioze pripensas tutarpitanan komunikadon, ĉu skriban ĉu parolan. Lastatempe ĝi kunvenigas arpitajn parolantojn de tuta Arpitano, por ke ili kune parolu. Tiuj interparoloj estas filmataj por posta studado.

Kiu skribsistemo?

La dua grava problemo estas la skribsistemo. Mi ne povus nombri la diversajn skribojn, tiom ili multas. En Piemonto iuj eĉ havas propran skribsistemon. La personoj, kiuj volas vere paroli la arpitanan ankaŭ konscias pri tiu problemo kaj cerbumas por trovi solvon. Por bone kompreni la problemon kaj la solvon oni devas scii, ke por la gaŭlolinaj lingvoj tre taŭgas ortografio simila al la franca, eĉ se ĝi suferigas la lernantojn. Ĉar ĝi konservas spurojn de sia latina deveno kaj tio faciligas la komprenon. Lerni ĝin malfacilas sed legi ĝin tre faciligas la komprenon, kiel eble vi mem spertis legante la diversajn literaturajn eliraĵojn pli supre. Kaj, por legado, tio pli gravas ol fonetikaj informoj, ĉar ni neniam povas legi kun la prononcmannerio de ĉiuj dialektoj.

Tre taŭgan proponon en tiu senco faris la franca kaj svisa lingvisto *Dominique Stich* en sia libro: *Parlons Francoprovençal, une langue méconnue* (Ni parolu la francprovencan, malmulte konatan lingvon) aperinta en 1998 (13).

Dominique Stich konsideras, ke, ĉar ĉiu arpitana dialekto havas propran foneman sistemon, necesas krei **superfonemojn**.

Ekzemple, se ni konsideras la superfonemon [ʃ], kiu realiĝas en la diversaj dialektoj per [dz], [ʃ], [ʒ], [dʒ] kaj en Esperanto per ĵ- ĝi skribiĝos en la Ortografio de Referenco B: -j-.

Jen ekzemplo de frazo en la fonetika ortografio de *Conflans* (por tuta Savojo) kaj en la Ortografio de Referenco B (ORB):

Esperanto:	la ŝafido ŝajnis manĝi pajlon en la kampo malhela.
Loka fonetika ortografio:	l'anyé sêmlâve mēzhi de paille dêle shan klyâ
ORB:	l'agnél sêmlâve megîér de palhe dens lo champ clîâr.

Fakte *Dominique Stich* uzis la latinan formon por pli-malpli trovi la superfonemon.

Superfonemo	Latina	Franca	Arpitana	Okcitana
{p}	PASSUS	(le) pas	pâs	pas
{b}	BARBA	barbe	bârba	barba
{m}	MATREM	mère	mâre	maire
{f}	FEMINA	femme	fèna	femna
{v}	VIRIDEM	vert	vèrd	verd
{t}	TESTA	tête	téta	tèsta
{d}	DICERE	dire	dère	dire
{n}	NASUM	nez	nâs	nas
{g}	GUSTUM	goût	gôt	gost
{l}	LICERE	loisir	lèsir	léser



Tiu propono vekis grandan malkomprenon inter la parolantoj de la arpitanaj dialektoj, kiuj plejmulte ankoraŭ ne sentis la bezonon de komuna lingvo. Ilin ŝokis la fakto, ke alemandevena parizano okupiĝas pri ilia *patois*, kaj trovis, ke la skribo tro similas la francan, ili havas la impreson, ke ilia dialekto, skribita en tiu ortografio, ne plu estas la propra.

Tre eta grupo tuj entuziasmiĝis por tiu ĉi skribo kaj *Alain Favre*, prezidanto de *IKEL*, eldonis vortaron francprovencan-francan laŭ la Ortografio de Referenco B (ORB) kun antologio pri tekstoj de ĉiuj arpitanaj regionoj en loka ortografio kaj en ORB. La tre konata franca lingvistino *Henriette Walter* verkis la antaŭparolon. (14)


Malgraŭ la listo de la proponitaj vortoj, kompreneble tre limigita kompare kun la riĉeco de la dialektoj, la vortaro tute ne proponas komunan lingvon, pri kiu neniu pensis ĝis nun kaj tio certe ne taŭgas.

Grupeto kuniĝis ĉirkaŭ l'ORB, kiu nomiĝis *Aliance Culturelle Arpitania* kaj aperigis tradukaĵon de "*L'Affaire Tournesol*", aventuro de Tinĉjo okazanta ĉefe en la vaŭda kaj ĝeneva regiono kun la nomo "*L'Affère Pecârd*". Oni uzis la nomon de la Profesoro



Auguste Picard, kiu inspiris la aŭtoron, *Hergé*, por krei la heroon de la bildstrio, la Profesoron *Tournesol*. Informojn pri ĝi vi trovos ĉe la sekva adreso: tintin.arpitania.eu.

Ankaŭ aostvala verkisto ankaŭ entuziasmiĝis pri la skribsistemo kaj komprenis, ke dank'al tiu ortografio liaj romanoj povos esti legataj en tuta Arpitanio. Temas pri *Floran Corradin*. Male al la aliaj verkistoj, kiuj deve aperigas siajn verkojn dulingve, li publikigis romanon en ORB, *Lo Temps* (La Tempo) (15). Por esti vere komprenata de ĉiuj li uzis piednotojn kun diversaj sinonimoj arpitanaj. Kaj tiel li povis eviti la dulingvan publikigon, kiu malavantaĝigas la uzadon de la arpitana. Plie, tiu facila lega kompreno limiĝas ne nur al la diversaj dialektoj de la arpitana sed ankaŭ al la okcitana kaj kataluna, kiuj uzas similajn ortografiojn. Ŝajnas, ke la romano pli aĉetiĝis de okcitanaj ol de arpitanaj.



La administracia regiono Rodano-Alpoj kaj la arpitana

La plej granda parto de la areo de la arpitana troviĝas nun en Francio kaj ĝis la jaro 2016 en la administracia regiono *Rhône-Alpes* (Rodano-Alpoj). En julio 2009 ties konsilio alprenis raporton celantan «agnoski, plivalorigi kaj promocii la okcitanan kaj francprovencan, regionajn lingvojn de Rodano-Alpoj.» Kelkaj agoj sekvis, interalie la publikigo de tre interesaj etformataj libroj pri literaturo.

Maje de 2015 Rodano-Alpoj (Francio) kaj Aosta valo (Italio) subskribis ĉarton cele al kunlaborado por pli bone vivi la lingvon francprovencan – ĝin diskonigante kaj instruante, kreante spektaklojn... Ili apelaciis al aliaj regionoj kaj entute teritoriaj kolektivoj (ĝis municipoj) subskribi la saman dokumenton kaj do partopreni en la agado.

Sed ekde januaro 2016 Rodano-Alpoj ne plu ekzistas, tiu jam grandega administraciejo mergiĝis en la giganta *Auvergne-Rhône-Alpes*, pli vasta kaj havanta pli multajn loĝantojn ol tuta Svislando. Kaj samjare venkis en la regionaj balotoj konservemuloj, kiuj tute prifajfas regionajn lingvojn. Nun tiu dekstra partio trapasas gravegajn malfacilaĵojn – *Laurent Wauquiez*, nacia ĉefo de la partio, devis demisii sed li restas prezidanto de *Auvergne-Rhône-Alpes*. Oni povas prognozi novan politikan plimulton regionan post tri jaroj sed ankaŭ dubi, ĉu ĝi sincere favoros minoritatajn lingvojn.

AF

La arpitana elekteblas kiel opcio por abiturientiĝo en Francio, sed...

Delonge savoĵanoj postulas, ke la loka lingvo estu elektebla kiel opcio por abiturientiĝi. Tio okazas jam de pluraj jardekoj por aliaj tiel nomataj regionaj lingvoj en Francio, interalie la alzaca, bretona, eŭska, korsika, kataluna, okcitana... (kaj tie ĉi mi ne parolos pri la lernantoj, kiuj studas multajn temojn en sia regiona lingvo, kaj trapasas pli da provtestoj en ĝi). Laŭ la sinsekvaj ministroj pri edukado, la respondo povis esti nea, atendiga, iom sensignifa, eĉ absurda, sed antaŭ kelkaj jaroj la francprovenca estis finfine akceptita. Malmultaj gimnazianoj elektas ĝin, tutsimple ĉar mankas instruistoj, do kursoj. En neniu universitato kaj altlernejo de Arpitanio oni instruas didaktikon de tiu lingvo, eĉ se povas esti kelkhora prezentado jare por venontaj instruistoj, ĉefe de baza lernejo. Ankaŭ neniu kapabla lingva ĵurio estas starigita. Do la kandidatoj – deko estas antaŭvidata por la venonta sesio de abiturientiĝo – trapasas la lingvan ekzamenon en *Valence* (okcitana urbo, tamen ne for de Arpitanio) antaŭ komisiono de fakuloj pri la okcitana. Ĉu tiuj okcitanaj instruistoj havas bonan konon pri la arpitana kaj ĝia literaturo? Pri tio oni kompreneble rajtas dubi.

AF

Ankaŭ kun la celo rigardi la lingvon laŭ ĝia tuteco, retejo, “*Lo Trèzor arpitan*”, proponas kunlaboran konstruon de reta vortaro por tuta arpitanio kun la sekva ideo: «Ni kunlaboru ĉiuj kune por ke povu ekzisti oficiala arpitana unuigita lingvo, kiun ni uzos por la skriba komunikado kaj por formalaj situacioj, por la neformala komunikado, ni chiam konservu niajn gepatrajn dialektojn.» <arpitan.eu>



El Vikimedio. Aŭtoro: Arpitano.

Dulingva indikilo enire de vilaĝo en Savojo.

Foto ĉidekstra: kunveno de la Konsilantaro Internacia Francprovenca (CIF) dum la 37a internacia festo de la arpitana. CIF ankaŭ celas renkontiĝon de ĉiuj arpitanoj. De maldekstre *Christiane Dunoyer*, direktorino de *CEFP* (p. 13), *Marc Bron*, instruisto de la arpitana kaj prezidanto de la konsilantaro, *Ornella de Paoli*, prezidantino *EFFEPI* (Piemonto) (*Etnismo* 74), *Odile Lallard*, tre aktiva savoĵanino.



El Vikimedio. Aŭtoro: Badadia.

Vido al la konferenca salono dum la 37a Internacia festo de la arpitana en *St Etienne*. Organizita de *Aliance Culturèla Arpitania (ACA)* en septembro 2016.



El Vikimedio. Aŭtoro: Badadia.

Minacataj lingvoj laŭ UNESCO

La tutmonda UN-ligita organizaĵo UNESCO uzas skalon por indiki la minacostaton de lingvoj. Tiu skalo iom similas tiun, kiun oni adoptis internacie por indiki kiomgrade biologiaj specioj estas minacataj. Jen tiuj ŝtupoj kaj la rilataj kriterioj, kun kreskanta grado de minacoj:

FRAGILA: plej multaj infanoj parolas la lingvon, sed ties uzo limiĝas al iuj kampoj (ekzemple hejmo).

KLARE ENDANĜERIGITA: infanoj ne plu lernas la lingvon hejme.

SEVERE ENDANĜERIGITA: nur geavoj kaj pli ĝenerale olduloj parolas la lingvon, la posta generacio nur komprenas ĝin (pasiva kono).

KRIZE ENDANĜERIGITA: nur olduloj parolas la lingvon, sed malofte kaj parte.

MALAPERINTA: neniu plu uzas la lingvon.

UNESCO publikigas liston de lingvoj kun por ĉiu el ili la nombro de parolantoj kaj la grado de minaco. Kompreneble oni periode devas revizii tiun liston. El la proksimume 7000 konataj lingvoj almenaŭ 3000 verŝajne estos malaperintaj fine de la jarcento.

Laŭ tiu listo la arpitana/francprovenca, kiu havas supozeble 100 000 parolantojn, estas “klare endanĝerigita”. Fakte la situacio estas iom pli kompleksa, kaj similas tiun de multaj specioj, kiuj ne estas same minacataj en ĉiuj partoj de sia areo. Ekzemple en Aosta Valo la arpitana estas parolata de multaj junuloj, sed en Savojo ĝi nun estas plejofte konata nur de mezaĝuloj kaj maljunuloj, kun grandaj diferencoj geografiaj (inter urbo kaj kamparo, lokoj tre turismaj aŭ pli trankvilaj). Kaj ekzistas alia kriterio, tiu de la kvalito de la lingvo, kiu ekzemple en Aosta Valo rapide italiĝas same leksike kiel sintakse, dum ĝi emas franciĝi en aliaj lokoj.

AF

Konkludo

Mi finos tie, informante, ke la arpitana estas rekonata en la Eŭropa Ĉarto pri Regionaj Lingvoj fare de Italio, kaj ekde 2018 ankaŭ de Svislando. Tiu lasta rekono, laŭ la oficiala nomo francprovenca, redonis elanon al la lingvo, eĉ se ni ne povas atendi miraklon de ĝi.


Mi devas agnoski, ke la arpitana ne tiom bone fartas. Sed ekzistas iuj interesaj moviĝoj kaj iniciatoj nun inter ĝiaj parolantoj kaj multaj entuziasmoj, kiuj volas plu vivi la arpitanan. Tio okazas ankaŭ, kaj mi

diru ĉefe, inter junuloj kaj mezaĝuloj. La aventuro, laŭ mi, ege valoras por konservi tutmondan kulturan diversecon.

NM

Kiel vi povis vidi la ĉi supra artikolo estis kompletigita de kelkaj enkadraj artikoletoj verkitaj de *Alain Favre*.

Rozaĵo, ofta simbolo sur la Alpoj mebloj en Arpitano.



Aŭtoro: Auvé73.

Notoj:

- 1) *“Le Francoprovençal. Progrès d’une définition”* Gaston Tuaillon. Centre d’études francoprovençales “René Willen”.
- 2) Gaston Tuaillon, *“La littérature en francoprovençal avant 1700”*. Eldonejo: Ellug Université Stendhal, Grenoble, 2001.
- 3) Marguerite d’Oingt, *“Expériences mystiques et récits édifiants”*. Textes rédigés en francoprovençal et en latin par une moniale du XIIe siècle. Edition bilingue (francoprovençal/latin-français), Collection Régionales. Eldonejo: Livres EMCC, Rhône-Alpes.
- 4) Amélie Gex, *“Poésies et contes de Savoie”*. Édition bilingue (francoprovençal Savoyard – français), Collection Régionales. Eldonejo: Livres EMCC, Rhône-Alpes.
- 5) La tuta poezio estas legebla kaj aŭskultebla ĉe: <https://youtu.be/SD0WqsGAFsI>
- 6) Pierre Guex-Borgeaud, *“Lo sabliâi d’oo”* Eldonejo: Âi Sansounet. Broŝureto ankaŭ en la franca, mendebla ĉe: n.margot@bluewin.ch.
- 7) Vidu: Sylvain Soleil, de Villers-Cotterêts, cadre juridique de la politique linguistique des rois de France. [arkivoj], Colloque de Rennes des 7 et 8 décembre 2000 Langue(s) et Constitution(s).
- 8) *«Le Plaict Général de Lausanne de 1368 “translaté de latyn en françois”»*. édité par Yann Dahhaoui, commenté par Jean-François Poudret. Cahiers Lausannois d’Histoire Médiévale 43.
- 9) Bridel-Favrat, *“Glossaire du patois de la Suisse romande”*, 1866. Reeldono: Slatkine, 1984.
- 10) Philippe Bridel, *“Essai statistique sur le Canton de Vaud”*, 1818. Reeldono: Slatkine, 1978.
- 11) Ĝi konsulteblas rete <www.unine.ch/gpsr>.
- 12) <http://www.oarp.eu/>
- 13) Dominique Stich, *“Parlons francoprovençal, une langue méconnue”*. Eldonejo: L’Harmattan, 1998.
- 14) Dictionnaire francoprovençal-français, Dominique Stich, eldonejo: Le Carré, Thonon-les-Bains. Distribuanto: Alain Favre afavrel@hotmail.com
- 15) Florian Corradin, *“Lo Temps”*. Eldonejo: Aliance Culturèla Arpitania, 2008. Mendebla ĉe: n.margot@bluewin.ch.

Aliaj artikoloj pri la arpitana en Etnismo:

- “Intervjuo kun Ornella de Paoli” (la arpitana en Piemonte), *Etnismo* no 74, 31.12.2003.
- “Intervjuo de la vaŭda kantisto Lo Tian” (kantisto, kiu kantas arpitanaŭde) p. 29 – 31. *Etnismo* no 99, 31.12.2017.



Esperanto-movado kaj indiĝenaj lingvoj

Naskiĝo de *Etnismo* kaj IKEL

Enkonduko

La organizantoj de la 96a Germana Esperanto-Kongreso proponis al mi paroli pri la temo “indiĝenaj lingvoj”, lige kun la kreo kaj laboro de IKEL. Tiu temo tuj logis min, sed kun perspektivo pli larĝa ol nura kreo de IKEL. Oni ofte ripetas, ĉefe en tiu ĉi UNESKO-jaro de indiĝenaj lingvoj, ke dum pli ol jarcento la esperantistoj kaj pli precipe UEA estas aparte sentemaj pri tiu temo. Sed, konante iom la historion de IKEL, mi ne kundividas tiun ĉi opinion kaj provis rigardi, kio vere okazis ekde la zamenhofa propono de Internacia Lingvo. Tiu trarigardo ja estas iom rapida kaj supraĵa kaj ĝi meritis pli profundan trarigardon de la zamenhofaj verkoj sed eble ankaŭ de tiuj de *Edmond Privat*, kiun mi tute ne citas ĉi tie. Do jen skribe, kion mi diris dum la inaŭguro de la kongreso en unu kvaronhoru.

Iom pri Zamenhof

Zamenhof kreis Esperanton antaŭ ĉio por homa interkompreniĝo, kio en si-mem ege valoras. Sed li mem apartenis al minoritato kaj parolis minoritatan lingvon. Li do estis konscia pri la problemoj de minoritatoj kaj de indiĝenoj. En siaj tekstoj, Hilelismo kaj poste en Homaranismo, li multe traktis la temon. Li uzis la vorton gento, kiu iom proksimas la nocion de etno. Mi citos la unuajn vortojn de Homaranismo: «La homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco.»

Li ne parolis pri internacia aŭ interŝtata justeco sed pri intergenta. Li konsciis, pro memsperto, ke naciŝtato ne necese respondas al unu sola gento aŭ etno. Tamen *Zamenhof* ne celis-defendon kaj pluvivigon de lingvoj en danĝero. Li male revis pri kunfandiĝo de la homoj en unu popolo, kiel li skribas en la lasta celo de Hilelismo: «La hilelistoj esperas, ke per konstanta reciproka komuniĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale homan popolon, sed tio fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompadu».

Kelkajn liniojn antaŭe li precizigas, ke tio devus okazi «... ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio...»

Du paĝojn poste: «la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj forigos la kaŭzon de ĉiuj militoj ...» sed kiam ekzistos tia egaleco: «... ekzistos nur homoj kaj regnantoj kaj ne gentoj...».

La unuaj esperantistoj ja inspiriĝis de homaranismo, tamen ili ne sekvis Zamenhofon, ĉefe kiam li volis krei neŭtralan tutmondan religion.

Ekde sia unua statuto UEA klare montras, ke ĝi estas absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.

En 1948, UEA aldonas al tiu punkto pri neŭtraleco la respekton al la homaj rajtoj, kio ja estas ia mildigo de la neŭtraleco.

Kreo de IKEL

Dum la 70aj jaroj grupeto da esperantistoj, interalie *Uwe Joachim Moritz*, parolanto de la platdiĉa, kun katalunaj, italaj, nederlandaj, germanaj esperantistoj, aktivis en la “Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturo (AIDMLK)”. Tiuj esperantistoj konsciis, ke nur internacia lingvo politike neŭtrala povas esti uzata internacie en plena respekto de la minacataj lingvoj, kiujn ili defendas. Ili forte batalis por enkonduki Esperanton kiel laborlingvon kaj sukcesis, ke en 1972 la membroj de tiu ĉi asocio proponu, ke la nomo de la asocio estu en Esperanto. Mi citas la raporton de *Uwe Moritz* pri la 5a kongreso de AIDMLK okazinta en 1972:

«Unue, oni spertis ĝis maksimumo la ĝeneton kaj 70-procentan tempoperdon pro sinsekva tradukado inter la slovena, itala, franca kaj germana. Due, sen instigoj flanke de la esperantistoj, pluraj funkciuloj de AIDMLK ripete emfazis la utilecon de la Internacia Lingvo, kaj la kongreso decidis, ke – por eviti la impreson de kia ajn lingva imperiismo – la UNUA nomo de la asocio estu en Esperanto.»

Sed jam du monatojn antaŭe aperis la unua numero de *Etnismo*. Jen kiel *Uwe Moritz* ĝin enkondukis:



«*Etnismo* estos nete ne neŭtrala. Ĝi traktos ĉiujn politikajn ekonomiajn kaj kulturajn problemojn koncerne etnojn, kaj ĝi propagandos certajn ideojn. Ni opinias, ke *Etnismo* utilos por konsciigi sian publikon pri larĝeco horizonta bezonata por funde kompreni la mondan lingvoproblemon. Luktado kontraŭ lingva diskriminacio neniel povas limiĝi al la ŝtataj lingvoj,